

La Nobel-premiitoj : Centa datreveno de la naskiĝo de la Nobel-pacpremiito
Albert Schweizer, 4-a parto. La unua Nobel-pacpremiito Henry Dunant
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 592, 1975.02.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de la jubileo Albert Schweizer ni prezentas al vi historieton de la Nobel-pacpremiitaro.
Vi aŭdas la kvaran prelegon de tiu serio.

A.- La libro *Rememoro pri Solferino*, originala titolo *Un Souvenir de Solférino*, de Henry Dunant, la unua Nobel-pacpremiito, alportis en 1862 milit-literaturan revolucion. Vastega publiko malkovras, kio fakte estas bataalkampo, kio estas la sorto de la vunditoj, eĉ se ili heroe defendis sian patrimon. Vastega publiko malkovras la barbarecon de la militarto. La dio Marso subite perdis sian glorkronon.

Cl.- Jen ni hodiaŭ citas al vi erojn el tiu epokfara libro laŭ la traduko de Vaillant kaj Fruictier.
Vi rimarku la realismon kaj samtempe simplecon de la priskriboj :

A.- « *Sur kaheloj de la Castiglione'aj preĝejoj, flanke ĉe flanko estas metitaj ĉiunaciaj viroj ; Francoj, Germanoj, Slavoj, Araboj estas provizore amasigitaj ĝis la fundo de la kapeloj. Multaj jam ne havas forton sufiĉan por movi sin kaj povas nek moviĝi nek iom ŝoviĝi pro la mallarĝeco de la spaco, kie ili kuŝas. Ĵuroj, blasfemoj, krioj, tradukeblaj per nenia esprimo, sonadas sub arkaĵoj de la sanktejoj.* »

Cl.- « *Ha, Sinjoro ! Kiom mi suferas* », diras al mi kelkaj el tiuj kompatinduloj ; « *Oni forlasas nin, oni lasas nin mizere pereadi, kaj tamen ni brave batalis !* »

A.- « *Ili povas neniel ripozi, malgraŭ la sendormaj pasintaj noktoj kaj la elportitaj lacigoj. Ili petegas helpon, kiu ne estas donata. Kelkaj tordas sin pro malespero en konvulsioj finiĝontaj per tetano kaj morto. Aliaj, kredante, ke la malvarma akvo verŝata sur iliajn pusoplenajn vundojn, elvokas vermojn, kiuj montras sin grandamase, rifuzas, ke oni malsekigu iliajn bandaĝojn.* »

Cl.- « *Aliaj ankaŭ, havinte la favoron esti bandaĝataj ĉe la provizoraj vunditejoj de la bataalkampo, ne estis plu flegataj dum la deviga haltado en Castiglione, kaj ĉar tiuj tolaĵoj ekstreme streĉitaj pro la estontaj skuoj dum la vojirado, ne estas ŝanĝitaj, ili suferas veran turmentadon.* »

A.- « *Tiuj ĉi, kies vizaĝo estas nigre kovrata de muŝoj plenigantaj aeron kaj gluiĝantaj sur la vundoj, ĉiuflanken ĵetas senprudentajn rigardojn. Sed neniu respondas al ili. Ĉe aliaj, kapoto, ĉemizo, karno kaj sango formis densan mason, kiun oni ne povas forigi.* »

Cl.- « *Tie ĉi kuŝas soldato tute sebvizaĝigita; lia lango elpendas el lia rompita makzelo. Li skuetas sin kaj volas stariĝi; mi malsekigas lian sekiĝintan palaton kaj malmoliĝintan langon; kaptinte plenmanon da ĉarpio, mi tempas ĝin en sitelon portatan post mi kaj elpremas akvon el tiu kvazaŭspongo en la senforman malfermaĵon, kiu anstataŭas lian buŝon.* »

A.- « *Tie kuŝas malfeliĉulo, kies parto de l' vizaĝo, nazo, lipoj, mentono, estas fortrancitaj de glavbato. Nekapabla paroli, duonblinda, li faras signojn mane kaj per tiu kortuŝega*

pantomimo akompanata de gorĝaj sonoj, tiras al si atenton. Mi donas al li trinki, fluigante malforte sur lian sangokovritan vizaĝon iom da pura akvo. »

Cl.- « *Tria, kun malfermita kranio, elspiras, disverŝante sian sangon sur la preĝejajn kahelojn. Li prezentas abomenan vidaĵon ; liaj sammalfeliĉanoj forpuŝas lin piede, ĉar li ĝenas la preteriradon. Mi ŝirmas liajn lastajn vivmomentojn kaj kovras per poŝtuko lin kompatindan kapon, kiun li ankoraŭ movas iomete. »*

A.- Jen poste parto de priskribo de amputacio :

Cl.- « *[...] Franca kirurgo, kiu faras la amputojn, preteriras (la liton de imperiestra gvardiano) ; la malsanulo kaptas lian manon kaj premas ĝin en la siaj, kies tuŝo similas tiun de brula fero. »*

A.- « *Ne doloru min ! Terura estas mia sufero ! »* li krias.

Cl.- « *Sed oni devas agadi, kaj senprokraste. [...] La kirurgo, malvarmsenta kaj decidema, respondas : « Lasu min agi ».* Li rapide levas la kovrilon. La rompita kruro duoble ŝvelis ; el tri lokoj elfluas multa kaj malbonodora pusaĵo ; violkoloraj makuloj pruvas, ke ĉar arterio rompiĝis, la sola rimedo, se unu ekzistas, estas la fortranĉo. [...] »

A.- « *[...] (La vundito) fine kuŝas sur la operacia tablo [...] La kirurgo, tute okupata de sia afero, aŭdas kaj vidas nur sian operacion. Juna militkuracisto tenas la brakojn de la paciento dum la flegisto, kaptinte la sanan kruron, tiras la malsanulon al la rando de la tablo. Tiu ĉi, timigita, ekkrias : « Ne lasu min fali ! » kaj li konvulsie premas en siaj brakoj la junan kuraciston, kiu subtenas lin kaj, pala pro kortuŝeco, estas mem preskaŭ egale konfuzita. »*

Cl.- « *La operanto [...] preninte en la manon la terurigan trancilon, ĉirkaŭŝovas sian brakon ĉirkaŭ la gangrenitan membron de la soldato kaj fendas la haŭton tute ĉirkaŭe. Ŝira krio sonas en la hospitalo. La juna kuracisto, vizaĝo ĉe vizaĝo kun la turmentato, povas rigardadi sur liaj kuntiriĝintaj trajtojn la plej malgrandajn detalojn de tiu abomena agonio. « Kuraĝu », li diras mallaŭte al la soldato, kies manoj kroĉiĝas sur lian dorson, « ankoraŭ du minutojn kaj vi estos liberigita ! »*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!